

AMO finfine survojas al ĉeestaj eventoj

Kulturo estas la temo de la jubilea 75a seminario. Kulturo laŭdifine estas socia fenomeno, eĉ solartista bezonas spektantojn, aŭskultantojn, publikon. Same, la fizika kunesto gravas por la AMO-seminarioj. Unuafoje depost januaro 2020, ni okazigis seminarion kun pli da surlokaj partoprenantoj (ĉ. 30) ol virtualaj partoprenantoj (nur 6). Tio ne estas miriga, la ĵusa VK2 kaj pleto de pliaj virtualaj elektebloj plene elĉerpis la zomemon de la plimulto de nia devige diaspora komunumo. Tamen, la AMO-programo multon lernis el la 18-monata virtuala periodo: seminarioj estonte hibridos, per kombino de surlokuloj kaj virtualuloj.

AMO 75 malfermiĝis en la 27a de julio per la jam dissendita enkonduko (EKO 24), kiu resumas, ĉefe en bilda formo, la buntecon de la kultura vivo en Esperanto. Sekvis Renée Triolle, multjara aktivulo de UEA kun la temo “Esperanto - kaŝita interkulturilo”. Ŝi montris, kiel ŝi iom post iom malkovris la veran potencialon de kontaktoj fareblaj pere de Esperanto. Ŝi emfazas la rolon de Unesko kaj la eldona laboro de UEA kune kun Unesko, ekzemple per gravaj literaturaj ĉefceloj ene de la multjara programo de UEA ‘Okcidento-Oriento’. Ŝi citis du esencajn deklarojn de Unesko: ‘La kultura diverseco estas saame necesa al la homaro kiel biodiversecon al la naturo’, emfazante plie la rajton de unuopuloj esprimi sin per propra aŭ memelektita lingvo. Ŝi donis ekzemplojn pri interkulturaj konoj, aŭ iliaj mankoj.



Sekvis Francois Lo Jacomo, ŝlosila aganto pri la Kulturcentro Greziljono, prezentis la temon: ‘Esperanto-kulturo aŭ kulturo pere de Esperanto’ Li skizis la historion pri la klopodoj rajtigi Esperanto por la abiturienta ekzamenoj, procezo, kiu ekis en

1898, dek jarojn pli frue ol la lanĉo de UEA! Eĉ tiom malfrue kiel 2007, la aŭtoritatuloj rifuzis la petojn ĉar ‘Esperanto ne havas sian propran kulturon’. La nunaj postuloj estas malpli facile dementeblaj: la esperantistoj devas pruvi, ke ili havas sufiĉajn dezirantojn por la studado. Grava bazono estas la aliro al informoj pri la kulturaj konoj dezirindaj por konsciencaj esperantistoj. Libroj pri tio tradicie ekzistas, sed eĉ la 300 mil artikoloj de Vikipedio ne plene kovras la bezonojn. Tro multas la pliaj interesa enhavo por dokumenti nun.

La lasta prelego de la tago venis el Rusio, kun la temo ‘Libroeldonado’ nesuprizo prezentita de la teamo de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, gvidantoj de la eldonejo Impeto. Ili diris tion, kion ni ĉiuj scias, la merkato por fizikaj libroj ege ŝrumpas kaj profitoj por eldonado de fizikaj libroj ne plu estas. Plie la loĝistiko por la distribuado de fizikaj libroj krevis, nelaste pro la pandemio. Kreskas la rolo de retlibroj kaj prosperas tiuj eldonistoj, kiuj majstris la arton. Tion certe faris ‘Impeto’ – konstati mem la mirindan kolekton de senpage elŝuteblaj libroj ĉe <impeto.trovu.com/prozo>, la plimulto same akireblas en fizika formo.

Entute valora tago, kun altnivelaj kointribuoj.